

ATENTU!

Jen la unua kajero de ĉi tiu tutmondfama verko, de la publiko mem dependas la kiel eble plej rapida apero de ceteraj kajeroj, ĉar tio ĉi estas sekvo de la aĉetado. Estas atentinde, ke la poŝtotarifo estas tre alta kaj tamen la prezo estas malalta 0,60 sv. fr., sed Esperantistoj, Grupoj kaj Asocioj, atingos 10 % da rabato mendante Kvindek specimenojn minimume. Estas postulata antaŭpago. Skribu tre klare al S-ro Ludoviko Torrent. Presejo. Strato Válgame Dios, 6, Madrid.

Ĉi tiu kajero estas ankaŭ la *naŭa* de la unua serio el *dehda* de la HISPANA ESPERANTO-BIBLIOTEKO de S-ro Julio Mangada Rosenörn (Glorieta de Bilbao, 5, Madrid), kiu nur akceptas abonojn (abonprezo por la serio estas 8,50 pesetoj) ne liverante aparte la kajerojn. Abonanto tuj ricevos *naŭ kajerojn*: el ili «AVILA», kun 30 bildoj; «El Moderna Hispana Parnaso», kun multaj bildoj tre belaj, «Popolkantaro de Murcia», kun muzikaĵoj, «Ferdinando VI^a kaj FARINELLI», novelo verse kaj proze verkita de J. Mangada; DU JUNAJ FRAŬLINOJ kaj «KORNELIINO», du noveloj de la aŭtoro de l'KIĤOTO, k. c. Estas preparataj aliaj verkoj tre interesaj, el ili, kompleta Muzikfolkloro de Kubo, kun multenombraj muzikaĵoj. Ĉiuj antaŭaj anoncoj pri prezoj ne valoras. Oni ne akceptas respondkuponojn.

Baldaŭ aperos la gazeto «ANTAUEN», kun bildoj kaj interesa enhavo, kiu estos komplemento de la HISPANA ESPERANTO-BIBLIOTEKO, kaj ĝi estos TUTE SENPAGA por la ABONANTOJ la BIBLIOTEKON.

LA GENIA KAVALIRO
DON KIĤOTO
DE LA MANCHA
VERKITA DE
MIĤAELO DE CERVANTES
SAAVEDRA

TRADUKITA DE
JULIO MANGADA ROSENÖRN

Prezo: 0,60 sv. fr.

MADRID
PRESEJO TORRENT KAJ KOMP.¹⁰
1927

2302



Federación Española de Esperanto
Hispana Esperanto - Federacio

Rodríguez San Pedro 13 - 3º - 7, E-28015 MADRID
Tel. +34 - (91) - 4468079



Federación Española de Esperanto
Hispana Esperanto - Federacio

Rodríguez San Pedro 13 - 3º - 7, E-28015 MADRID
Tel. +34 - (91) - 4468079

DON KIŤOTO DE LA MANCHA

2302



LA GENIA KAVALIRO

DON KIŤOTO
DE LA MANCHA

VERKITA DE
MIŤAELO DE CERVANTES
SAAVEDRA

TRADUKITA DE
JULIO MANGADA ROSENÖRN

Prezo: 0,60 sv. fr.

MADRID
PRESEJO TORRENT KAJ KOMP.¹⁰
1927

5062

ANTAŬDIROJ DE LA TRADUKINTO

Por fari ĉi tiun tradukon mi utiligis eldonon, kiun publikigis, je 1797, Bibliotekisto de la Reĝo kaj Akademiano de la Reĝa Historia Akademio, S-ro Johano Antono Pellicer, kiun oni republikigis je 1905, kaj kiu entenas, krom nova analizo de la ĉefverko kaj vivo de Cervantes, multenombrajn rimarkindajn notojn, kiujn mi nur tradukis mallonge; ankaŭ mi utiligis la verkon de la eminenta filologo Julio Cejador Frauca, titolitan «La Lingvo de Cervantes. Gramatiko kaj Vortaro de la Kastila Lingvo en La Genia Kavaliro Don Kihoto de la Mancha». Mi celis, konservante la plenan spiriton de la ĉefverko, alĝustigi kiel eble plej fidele la stilon de la glora aŭtoro al nia internacia lingvo.

Laŭ Cejador, flankenasante «Trezoron de Stephano» kun 150.000 vortoj (angla eldono) kaj anglan Vortaron de Webster kun 70.000 vortoj elĉerpitaj el ĉiuj lingvoj de la mondo, estas rimarkinde ke la vulgara kaj erudicia lingvo de Kastilujo dum la tempo de Cervantes konsistis proksimume el 40.000 vortoj, eksterordinara nombro da vortoj por tiu epoko (kiam la kampo de la ideoj estis tre limigata) rilate al 379 vortoj de la koinformaj skribaĵoj, al 658 vortoj de la egipta Vortaro de Bunsen kaj al 5642 de la tuta Malnova Testamento. Cervantes liveras al ni per la Kihoto nekompareblan riĉaĵon el vortoj. Nur 300 vortojn uzas la kamlaboristoj de iuj anglaj vilaĝoj, laŭ M. Müller; sufiĉe instruita anglo, studinte kaj legante ĉiutage ĉiajn librojn, ankaŭ laŭ Müller, uzas 3.000 aŭ 4.000 vortojn por siaj konversacioj; tuta verkaro de Milton entenas 8.000 vortojn; Shakespeare, la plej vortriĉa verkisto laŭ opinioj, uzis por sia kompleta teatra verkaro proksimume 15.000 vortojn. Nu; Cervantes, por sia Kihoto, kies amplekso aŭ volumo ne atingas la duonon de la

Shakespeara verkaro, uzis 9.350 vortojn, kaj oni devas konstati, ke same je la fino de la unua parto, kiel je tiu de la dua, ofte oni trovas novajn vortojn, kaj ke la dua parto havas pli da novaj vortoj ol la unua, kaj tial facile oni konscias, ke li same enkondukis novajn vortojn en la ceteron de sia verkaro, kaj alkalkuli al la tuta verkaro de Cervantes proksimume 20.000 vortojn. Laŭ Cejador, por sama skribajamplekso el Shakespeare kaj el Cervantes, ĉi tiu supermezuras leksikonon ties. Koncerne konstruicecon kaj modismojn, Cervantes ne havas rivalon.

RIMARKOJ PRI LA TITOLO DE LA VERKO


La adjektivo *genia* ne koncernas Don Kihoton, kiu nur estis viro kun bona intelekto, kiam kavaliŝrecaj manoj ne frenezigis lin; ĝi koncernas la verkon, rimarkigante la geniecon de la aŭtoro. Opinii alimaniere estus aljuĝi al Cervantes maldiskretecon kaj neprecizecon por apliki epitetojn, kaj estas konstatite tutplene, ke Cervantes estis tre sperta pri ĉi tiu aplikado, kaj li mem, kvankam nerekte, sin kvalifikas *akuta geniulo* (I.^a Parto. Ĉapitro XXX.^a). Tiam estis kutimo de la literaturistoj sin alnomi *geniuloj*. Okazas pri ĉi tiu ĉefverko same, kiel pri la verko de Apulejo *Asinus Aureus*, ĉar *aureus* koncernas la verkon pro ĝia perfekteco kaj ora stilo kaj ne *Asinus*'n.

Don estas kvazaŭ nobela titolo, devenante de *Dominus*, kiu tro disvastiĝis, ĝin aplikante al multenombraj personoj sen meritoj por tio, pro kio Cervantes ĝin aplikis ironie al la kavaliro, por tiamaniere riproĉi ĝian trouzon, Sanĉo mem diras (II.^a Parto. Ĉapitro XLV.^a): «Mi opinias, ke en ĉi tiu insulo estas pli da *don*'oj ol da ŝtonoj... mi sarkos ilin, ĉar, pro la abundeco, ili devas ĝeni pli ol la kuloj», kaj Tereso, la edzino de Sanĉo (II.^a P. Ĉap. V.^a): «Mi ne scias vere, kiu alnomis Don Kihoton *don*, ĉar liaj patroj kaj avoj ne posedis tiun titolon.»

DEDIĈO

Al Duko de Beĥar, Markizo de Ĥibrালেon, Grafo de Benal-kazar kaj Banjares, Vicgrafo de la Puebla de Alcocer, Nobel-mastro de la Urboj Kapilja, Kuriel kaj Burgiljos.

Je la bona akcepto kaj honoro, kiujn vi havas por ĉiaj verkoj, kiel Princo tre ema favori la bonajn artojn, des pli tiujn, kiuj pro sia nobleco ne submetiĝas je la servo kaj profito de la publiko, mi estas decidinta publikigi la *Gentan Kavaliron Don Kihoton de la Mancha* sub protekto de la klerega nomo de via duka Moŝto, al vi, tiel respekteme, kiel meritas via altrangeco, mi petas akcepti ĝin sub via protekto, por ke sub ĉi tiu, ĝi, kvankam nuda je eleganta kaj erudicia riĉa ornamajo, laŭ kutime vestas siajn verkojn la viroj, kiuj scias, kuraĝu riski certe la juĝon de iuj, kiuj, ne sin restigante ĉe la limoj de sia nescieco, kutimas kondamni, kun plej granda rigoro kaj malplej granda justeco, la fremdajn verkojn; kaj mi fidas, konsciante la saĝecon de Via duka Moŝto rilate al mia bondeziro, ke vi ne rifuzos tiel malgrandan servon.



Miguel de Cervantes

ANTAŬPAROLO

Neokupata leganto (1): Ne estas necese ke vi juru por kredi mian deziron, tio estas, ke mi volas, estu ĉi tiu verko, kiel naskita de la intelekto, pli bela, pli belsintena kaj pli diskreta, ol oni povas imagi; sed mi ne povis kontraŭstari la naturan ordon, ĉar ĉe ĝi ĉiu aĵo naskas sian similaĵon, kaj tial, kion povis naski mia nefruktodona kaj malbone kulturita intelekto pli, ol historion pri maljuna, seka, malgrasa, kapricema ido, plena je variaj pensoj kaj neniam imagitaj de iu ajn? Ĝi estas bona, kiel naskiĝinto en karcerio, kie ĉia maloportunaĵo havas sian lokon, kaj kie ĉia malgaja bruo starigas sian loĝejon. La trankvileco, modesta loko, plaĉa kamparo, sereneco de la ĉieloj, murmurado de la fontoj, kvieteco de la spirito, estas ja sufiĉa fundamento por ke la Muzoj plej sterilaj sin montru fruktoĉonaj kaj liveru al la mondo verkojn, kiuj ĝin satigos plene je mirindaĵoj kaj kontento. Foje okazas, ke patro havas malbelan kaj senkapablan filon, sed la amo, kiun por ĉi tiu sentas tiu, okulojn de ĉi tiu bandaĝas, kaj la patro ne vidas filajn mankojn, sed tute male, ĉi tiujn li konsideras diskretaĵoj kaj belajoj, ĉi tiujn rakontante al amikoj kvazaŭ akutaĵojn kaj spritaĵojn. Sed mi, kvankam verŝajne patro, estas vere duonpatro de Don Kiĥoto (2), kaj mi ne volas sekvi la ĝeneralan kutimon, nek peti vin preskaŭ okullarmante, kiel aliaj faras, karega leganto, ke vi pardonu aŭ ne atentu la mankojn, kiujn vi rimarkos sur mia filo; kaj tial ke vi ne estas lia parenco, nek lia amiko, kaj vi havas vian animon ĉe via korpo kaj vian agliberon kiel la plej liberezonemulo, kaj vi estas ĉe vi, kie vi

(1) Ĉar oni koncernas amuzantan libron.

(2) Ĉar Cide Hamete estas la patro, la aŭtoro atribuas al tiu la verkon.

estas mastro same, kiel la Reĝo mastrumas la procenton de la venditaĵoj (1), kaj vi scias tion, kion ĝenerale oni diras, ke kiu ajn povas mortigi la Reĝon ĉe sia penso (kio sendevigas kaj liberigas vin pri ĉiaj respekto kaj devo); tiel, do, vi povas diri pri la historio ĉion, kion vi volos, ne timante, ke oni kalumnii vin pro viaj malbonaj opinioj pri la verko, aŭ ke oni vin premiu pro la bonaj.

Mi volas nur doni al vi la historion sen aldonaĵoj, kaj nudan, sen la prologa ornamajo, sen la multenombreco kaj katalogo el kutimaj sonetoj, epigramoj kaj laŭdoj, kiujn, laŭ kutimo, oni antaŭmetas antaŭ la teksto de la libroj; ĉar mi certigas al vi, ke kvankam mi iom penadis por ĝin verki, multfoje mi lasis la plumon ne sciante skribi ian aĵon; kaj fojon, dubante, antaŭ la papero, la plumo subtenata de la orelo, la kubuto sur la pupitro kaj la mano ĉe la vango, pensante tion, kion mi diros, eniris malĝustatempe, neatendite, amiko mia, sprita, tre klera, kiu vidante min tiel enpripensigata, demandis al mi la kaŭzon de tia stato, kaj mi, ĝin klarigante, diris esti pensanta la prologon por la *Historio de Don Kiĥoto*, kio metis min tiamaniere, ke mi ne volis ĝin verki kaj eĉ malpli publikigi la heroaĵojn de tiel nobla kavaliro; ĉar, kiel vi povas konscii ne konfuzu min tio, kion diros la malnova leĝdonisto, kiun oni nomas publiko, kiam li vidos, ke mi, post tiom da jaroj dormante ĉe l'silento de la forgeso, tiel maljuna, donas al li nun legendon sekan same, kiel estas la sparto, fremdan je genieco, malfeliĉan je stilo, malriĉan je konceptoj kaj mankantan je ĉiaj erudicio kaj doktrino, sen avertoj en la margenoj kaj notoj ĉe la fino de la libro, kvankam mi vidas aliajn librojn (eĉ fabelajn kaj nereligiajn), esti plenaj je sentencoj de Aristotelo, de Platono kaj de la tuta amaso el filozofoj, mirigantaj la legantojn, prezentantaj iliajn aŭtorojn tre legintaj, erudiciaj kaj

(1) Procento jam konata ĉe la Roma Imperio, kiun starigis en Kastilujo, laŭ opinio, Alfonso XI^a por povi sieĝadi Algeciras (Alhéciras) je 1342. Poste ĉefa rento de la regno.

elokventaj viroj? Tiamaniere ke, citante la Sanktan Skribajon!, ĉiuj juĝos la aŭtorojn Sanktaj Tomasoj, kaj aliaj doktoroj de la Eklezio atentantaj por tio tiel ruzan saĝon, ke ĉi tiuj per aĵne priskribas vivliberan enamiganton kaj per alia kristanan predikadeton, rezultante esti kontento kaj regalo aŭdi aŭ legi la verkon. Ĉio tio ĉi mankos al mia libro, ĉar mi nek ion avertigos sur la marginoj, nek ion mi notas je la fino, eĉ nesciante kiujn aŭtorojn sekvas mia verko, mi ne enlistigos ilin je ĝia komenco, kiel faras ĉiuj verkistoj, laŭ alfabeto ordo, komencante per Aristotelo kaj finante per Ksenofonto kaj Zoĵlo aŭ Zeŭksiso, kvankam unu estis blasfemulo kaj pentristo la alia. Ankaŭ mankos al mia libro je la komenco sonetoj, kies aŭtoroj estos dukoj, markizoj, grafoj, episkopoj, kortegulinoj aŭ famegaj poetoj; kvankam se mi petus la versaĵojn al du-tri verkistoj, miaj amikoj, mi scias, ke ĉi tiuj ilin donus al mi tiajn, kiajn ne estus kapablaj verki la plej famaj hispanaj verkistoj. Fine, Sinjoro kaj amiko mia—mi daŭrigis—, mi decidis la jenon: Sinjoro Don Kihoto restos entombigata ĉe siaj arĥivoj de la Mancha, ĝis kiam la ĉielo liveru al li tiun, kiu lin ornamu per tiom da aĵoj, kiuj mankas al li, ĉar mi estas nekapabla je tio pro miaj nediligento kaj neklereco, kaj ĉar mi estas nature mallaborema kaj nesufiĉeca por serĉadi aŭtorojn dirantaj tion, kion mi scias diri al mi mem sen ilia helpo. De ĉi tio devenas la dubstato kaj enpripensiĝo en kiuj vi renkontis min; sufiĉa kaŭzo por tia stato estas tiu, kiun vi estas aŭdinta de mi.

Aŭdinte tion, mia amiko batante sian frunton per manplato kaj longe ridante, diris al mi: Je Dio, frato, nun mi konvinkiga pri trompo daŭranta tutan longan tempon de kiam mi konas vin, dum kiu mi vin konsideris diskreta kaj saĝa por viaj agoj; sed nun mi rimarkas, ke vi estas tiel malproksima de tiuj kvalitoj, kiel la tero estas de la ĉielo. Kiel? Ĉu estas eble, ke aĵoj tiel simplaj kaj tiel facile aranĝeblaj povas havi forton por dubigi kaj enpripensiĝi tiel maturan geniecon, kiel estas via, kutimigita trarompi kaj venki aliajn pli grandajn malfacilaĵojn? Vere, ĉi tion ne naskis manko da kapableco, sed supermezuranta mallaborema

kaj nesufiĉa rezonado. Ĉu vi volas konstati ĉu mi estas prava? Nu; atentu kaj vi konscios kiel tute rapide mi nuligas ĉiujn viajn malfacilaĵojn kaj riparas ĉiujn mankojn, kiuj, laŭ via diro, endubigas kaj malkuraĝigas vin por aperigi al la lumo de la mondo la historion de via fama Don Kihoto, lumo kaj spegulo de la tuta vagiranta kavalerio.

Diru, mi rediris, aŭdinte tion, kion li diris al mi: Kiamaniere vi pensas plenigi la malplenaĵon de mia timo kaj heligi la haoson de mia konfuzo?

Pri ĉi tio li diris al mi: La sonetojn, epigramojn aŭ laŭdojn verkitajn de altrangaj kaj titolitaj personoj por la komenco de la libro, kaj kiuj mankas al vi, facile vi povos anstataŭi per aliaj verkotaj de vi mem kaj ne kun granda penado, kaj baptante ilin poste laŭ via plaĉo, aljuĝante ilin al Prete Johano de Hindujo (1) aŭ al Imperiestro de Trapisondo, pri kiuj mi scias, ke ili estis famaj poetoj; sed kvankam ili ne estu estintaj tiaj, kaj estu iuj pedantoj kaj unugradaj licenciattoj vin akre cenzurantaj aŭ murmurantaj pri ĉi tiu vero, ĉi tio ne gravas, ĉar kvankam ili elserĉu la mensogon, ili ne tranĉos al vi la manon per kiu vi tion skribis.

La marginajn citaĵojn pri la libroj kaj verkistoj el kiuj vi elĉerpis la sentencojn kaj dirojn, kiujn vi aperigos sur via historio, vi atingos intermetante en vian tekston ĝustatempe sentencojn aŭ latinaĵojn, kiujn vi konas parkere, aŭ kies serĉado ne penigos vin, kiel ekzemple, pritraktante liberecon aŭ malliberecon, diri:

*Non bene pro toto libertas venditur auro,
(La libereco valoras pli, ol la tuta oro de la mondo),*

(1) Tradicia persono, kiun ĉiuj nomas kaj neniu konas, ĉi tiu persono koncernas vagan ideon pri reĝo-pastro ĉe malproksimaj landoj de Oriento, pro kio la Portugaloj, je la XV.^a jarcento, sciinte ke en Abisinio estis princo kristana, konsciis esti trovintaj Presten Johanon de Hindujo, sed poste kiam la Jezuitoj konigis Abisinion al Eŭropanoj, Prete Johano restis proverba, kiel princo tre malproksima ĉe la tempo kaj spaco.

kaj poste, sur la margeno citi Horacion, aŭ tiun, kiu diris tion; se oni pritraktus la potencon de la Morto, profiti:

*Pallida mors æquo pulsat pede pauperum tabernas
Regumque turres,
(La pala Morto same vizitas la kabanon de la malriĉuloj
kiel la reĝajn palacojn);*

se la amikecon kaj amon, kiun Dio ordonas havi por la malamiko, alkuru vi al la sankta skribaĵo, kaj ĉi tiun eniru eĉ iomete scivoleme, kaj diru almenaŭ la parolojn de Dio mem: *Ego autem dico vobis, diligite inimicos vestros* (sed mi diras al vi, amu viajn malamikojn); se vi pritraktus malbonajn pensojn, iru en la Evangelion: *De corde exeunt cogitationes malæ* (de la koro eliras la malbonaj pensoj); se nekonstantecon de la amikoj, jen Katono, kiu diras al vi per siaj du jenaj versoj:

*Donec eris felix, multos numerabis amicos,
Tempora si fuerint nubila, solus eris;
(Dum via prospereco viaj amikoj estos multenombraj,
sed se venus al vi malfeliĉo, vi restos sola);*

kaj per ĉi tiuj latinaĵetoj kaj aliaj similaj oni konsideros vin almenaŭ gramatikisto, kaj esti tia estas hodiaŭ sufiĉe honora kaj profitdona.

Pri tio koncernanta la notojn por la fino de la libro, certe vi povas fari laŭ jene. Se via libro citas iun giganton, vi faru ke li estu Goliaŝ, kaj nur per ĉi tio, kio estas facila al vi, vi havas gravan noton, ĉar vi povas diri: «Giganto Goliaŝ aŭ Goliat estis filisteo, kiun paŝtito Davido mortigis per forta ŝtonfrapo en la valo Terebinto, laŭ priskribas la libro de la Reĝoj», citante la ĉapitron per kiu la libro tion diras. Poste, por vin montri erudiĉiulo pri homaj scioj kaj kosmografiisto, vi aranĝu la historion tiamaniere, ke ĝi parolu pri la rivero Taĥo, kaj vi havigos al vi

tiel alian faman noton, dirante: «Reĝo de Hispanujo tiel alnomis la riveron: ĝia ŝprucejo estas ĉe tia loko kaj ĝi enfluigas en la Oceanan maron, lekante la murojn de la fama urbo Lisbono, kaj oni opinias, ke ĝia sablo entenas oron, k. c.» Se vi pritraktus ŝtelistojn, mi diros al vi la historion de Kako, ĉar mi ĝin konas parkere; se prostituistinojn, jen episkopo de Mondonjedo, kiu pruntedonos al vi Lamio'n, Lajdo'n kaj Floro'n, kaj ĉi tiu noto bone kreditigos vin; se kruelulinojn, Ovidio liveros al vi Medeo'n, kaj Virgilio Circeo'n; se kuraĝajn kapitanojn, Julio Cezaro mem sin proponos al vi per siaj Komentarioj, kaj Plutarko liveros al vi milon da Aleksandroj; se vi priskribus amojn, sciante iomete italan lingvon, vi renkontos Leonon Hebreon, kiu abundege provizos vin, kaj se vi ne volas iri en fremdajn landojn, ĉe vi mem, vi havas Fonseka'n, *Pri ano de Dio*, kiu havigos al vi kaj al plej dezirema geniulo ĉion ajn pri ĉi tiu temo. Fine, estas nur necese, ke vi celu citi ĉi tiujn nomojn, aŭ aludi ĉi tiujn historiojn, kiujn mi priparolis, sur via, kaj lasu al mi la postenon fari la notojn kaj citaĵojn, ĉar mi vin promesas pleniĝi la margenojn kaj kelkajn paĝojn je la fino de la libro.

Ni pritraktu nun la citadon de aŭtoroj, kiun havas la ceteraj libroj, kaj kiu mankas al via. La riparo por ĉi tio estas facila, ĉar nur vi bezonas serĉi libron, kiu citu ĉiujn alfabeto de la A ĝis la Z, kiel vi diras, kaj ĉi tiun alfabeton mem vi aperigos sur via libro; ĉar kvankam klare oni vidos la mensogon, ĉar vi ne bezonas profiti ilin, tio ne gravas, kaj eble estos iu tiel naiva, ke li kredos vin profitinta ĉiujn por via simpla kaj sincera historio; kaj almenaŭ taŭgos, se ne por aliaj aĵoj, tiu longa katalogo el aŭtoroj por doni je unua trarigardo aŭtoritatecon al la libro, des pli ĉar ne estos iu, kiu celos elserĉi ĉu vi sekvis aŭ ne ilin, ĉar ĉi tio estas negrava al li. Sed des pli la riparo estas facila, ĉar nun mi konscias, ke ĉi tiu via libro ne bezonas ion el tio, kio, laŭ via opinio, mankas al ĝi, ĉar ĝia teksto estas sprita ŝercado kontraŭ la libroj pri aventuroj de vagirantaj kavaliroj, pri kiuj neniam pensis Aristotelo, diris Sankta Basilio, kaj kiuj ne estis

samtempaj je Ciceron'; nek alĝustigās al ĝiaj fabelaj kaj malsaĝaj rakontoj la precizeco de la vero, nek la observadoj de la Astrologio; nek gravas por ĝi geometriaj mezuroj, nek pravaj refutoj de la argumentoj, kiujn utiligas la Retoriko; nek ĝi devas prediki al iu, miksante homaĵon kun diaĵo, speciala miksaĵo per kiu ne devas sin vesti kristana intelekto: ĉi tiu nur devas profiti ja imiton por tio, kion li verkos; kaj tial ke via verko nur celas nuligi la aŭtoritatecon kaj influon, kiujn havas la libroj pri kavaleriaĵoj ĉe la mondo sur la publikon, ne estas kialo por ke vi almozpetu filozofajn sentencojn, konsilojn de la Sankta Skribaĵo, fabelojn de poetoj, paroladojn de literaturistoj, miraklojn de sanktuloj; sed male, celi per simplaj, signifantaj, honestaj kaj bone aplikitaj vortoj laŭ simpla stilo, rezultu via dirmaniero belsona kaj sprita, pentrante laŭ ĉiaj viaj eblaj kapabloj kaj kiel eble plej vaste vian intencon, komprenigante viajn konceptojn, ne konfuzmiksante kaj enombrigante ĉi tiujn. Celu ankaŭ, ke, legante vian historion, melankoliulo ridu, ridemulo ridegu, simplulo ne ĉagreniĝu, diskretulo admiru la elpensajon, seriozemulo ne malestimu ĝin, kaj saĝulo ĝin laŭdu. Ja, metu vian celon preta renversi la maŝinon ne prave muntitan de ĉi tiuj kavaliŝoj libroj abomenataj de multaj kaj laŭdataj de aliaj pli multenombraj; ĉar se vi tion atingus, vi estus atinginta multe.

En granda silento mi restis, aŭskultante tion, kion mia amiko diris al mi, kaj tiamaniere mi konsciis liajn rezonadojn, ke, sen ia baro, mi ilin aprobis, konsiderante ilin bonaj, kaj per ili mem mi volis fari ĉi tiun prologon; per kiu vi rimarkos, milda leganto, la diskretecon de mia amiko, mian bonan ŝancon trovi, ĝustatempe, kiam mi havis bezonon, tian konsilanton kaj vian plifaciligon por konscii tiel sincera kaj sen labirintaj la Historion de la fama Don Kiĥoto de la Mancha, kiu laŭ opinio de ĉiuj loĝantoj de la Kamparo de Montiel, estis la plej ĉasta amanto kaj kuraĝa kavaliro, kiun de antaŭ multaj jaroj en nuntempon oni konis en tiuj ĉirkaŭaĵoj. Mi ne volas tro laŭdi la servon, kiun mi faras konigante al vi tiel rimarkindan kaj honoran kavaliron; sed mi

volas, ke vi danku min pro via kono pri la fama Sanĉo Panza, lia armservisto, kiu, verŝajne, laŭ mia opinio, posedas ĉiajn armservistajn kapablojn, kiuj en la amaso el vanaj libroj pri kavaleriaĵoj estas pritraktataj. Kaj fine, Dio donu al vi sanon kaj min ne forgesu. Mi atestas.

AL LIBRO DE DON KIĤOTO DE LA MANCHA

Urgando la Nekonata (1)

Se alvenas, do, la libr'
de klerulo al la man',
tiu ĉi ne diros jam
ke ne trafis celon vi;
sed se, male, kaptas ĝin
mano de idiotul',
vi tuj vidos kiel nur
li malsaĝas, kvankam mem
li sin, malgraŭ malkompre'n',
montros erudiciul'.

(1) Ĉi tiuj versoj imitas la 20.^{an} Leteron, libro 1^a, de Horacio, kaj same kiel ĉi tiu, Cervantes, alproprigante ilin al Urgando la Nekonata, parolas pri sia verko, koncerne ĝian varian bonŝancon laŭ la legontoj, ĉi ties diversajn opiniojn pri la verko kaj pri ĝia aŭtoro, konfesante ke li ne estas instruita, nek lia verko scienca, kaj ke liaj satiraj aludoj ne celas precizaĵon aŭ konatan personon, kvankam ilin interpretu erudiciuloj. Al la hispanaj versoj mankas la finoj, kaj ĉi tio estas elpensajo de Cervantes, kion poste oni imitas. Urgando estas kvazaŭ magiistino aŭ ensorcistino kaj falsa profetino, kiu aperas ĉe kavaliŝecaj verkoj diversmaniere, ĉu laŭ junulino aŭ maljunulino, malaperante subite, pro kio oni nomis ŝin *nekonata*, kaj Cervantes pro tio alproprigas al ŝi la neklaritan kaj misteran versaĵon.

Kaj ĉar diras al mi spert',
estas foliplena arb'
kontraŭ la sunvarmo sav',
Reĝa arb', ĉe Behar, jen
por vi; bona via stel'!
Princoj estas ĝia frukt',
floro ĝia estas duk',
nova granda Aleksandr',
iru sub ĝin, ĉar kuraĝ'
estas ŝato de l'Fortun' (1)

Pri kavalir' de Manĉuj'
aventurojn verkos vi,
ĉar rezonon perdis li
pro legadoj; tute, tuj,
lin ekscitis la plimult'
eĉ armitoj, kaj, per fort'
de l'Orlanda furioz'
kaj de l'amo granda ard',
jam atingis lia brak'
Dulcineon de l'Tobos'.

La hieroglifa lem'
ne vidĝu sur la ŝild',
kiam ĉio estas bild'
eĉ atutas simpla ker' (2),
simpla la dediĉo' de l'verk'
faros la mokanton nul'
pri ĉu Don Alvar' de Lun',
ĉu Anibal de Kartag',

(1) Oni aludas la dukon de Behar, al kiu Cervantes dediĉas la verkon, ĉar la duko, laŭ genealogiistoj, devenas de la Reĝoj de Navarro.

(2) Oni avertas la verkon por ke ĝi ne sin promesu publikan famon, aludante la hieroglifojn, kiujn la kavaliroj montris sur siaj ŝildoj por memori la gajnitajn entreprenojn, ĉar per ĉi tiu ludo, ĝi povas perdi.

ĉu Francisko ĉe Luhan,
tute plendis je l'Fortun' (1).

Ĉar ne volis la ĉiel'
ke vi estu kiel nigr' (2)
tiel klera pri latin',
ne la lingvon uzu, nek
vin faligu subtilec';
pruvu ne per filozof',
ĉar, kun malestima mok',
jen de la saĝulo fin',
kiu trafos nepre vin:
Kial, do, al mi kun flor'?

Ne vin kaptu afektaj',
nek pri fremdaj vivoj kon';
negravaĵojn lasi for
ja konsilas bona saĝ',
ĉar en vian kapon frap'
tuj fariĝos via ŝerc';
estu nepre via cel',
ke vin laŭdu bona fam',
verkaĉiston la kondamn'
frapos ĉiam sur la ter'.

(1) Alia avertas por ke la verkisto sin montru modesta kaj ne fanfaronu pri scienco, timante insultojn de instruistoj, atentante tion, kio okazis al Don Alvaro de Luna, kiu estis senkapigata en Valjadolido, kaj al Francisko I^o de Francujo, kiu estis malliberigata en Madrido, ĉe turo de nobela familio Luhan.

(2) Nigro nomata *Johano Latino*, kiu venis al Hispanujo dum sia infaneco, akompanante siajn gepatrojn, kaj kiu estis sklavo de la duko de Sessa (nepo de la Granda Kapitano), kun kiu la nigro kreskadis kaj studadis. La duko liberigis lin, kaj tial ke Johano estis spertega latinisto, oni alnomis lin tiamaniere, kaj li estis profesoro de la Universitato de Granado. Cervantes, aludante la nigron, esprimas ne scii sufiĉe la lingvon por citadi latinaĵojn, kiujn trouzis tiamaj verkistoj.

Ĉiam estas malsaĝej',
kiam vitra la tegment',
preni ŝtonon kun tendenc'
por ĝin jeti al najbar';
viron, kun tre granda saĝ',
gvidas ĉiam serioz',
ĉar se mankus, do, la zorg',
nur verkante por amuz'
de virinoj, jen trouz'
propra nur de idiot'.

AMADISO de Gaŭlo al DON KIHOTO de la Mancha

Soneto

Vi, kiu miajn vivon kaj eĉ ploron
Imitis, neamate kaj fatale
Izole; ne la gajan, tute male,
Ĉe la rokmont', falinte en doloron.

Vi, kiu trinkis larman la likvoron
Abundan sed salgustan, dum reale
La tero vin provizis tre lojale
Nutraĵojn, postulante ne trezoron (1);

Vi vivu certa je l'eterna famo,
Almenaŭ dume ĉe la kvara sfero
Ĉevaloj kuru de Apolo blonda,
Pro viaj kuraĝego kaj la amo;
Unua estos via land' ĉe l'tero;
Aŭtoro via, gloro ja tutmonda.

(1) Dum la pentanta vivo, kiun pasigis Don Kihoto en Montaro Morena, imitante tiun de Amadiso, la larmoj estis al li trinkaĵo, kaj herboj de l'herbejo estis al li manĝaĵo. afektante ĉiel la malriĉecon al kiu estas arĝento, stano kaj kupro, tio estas, trezoraĵoj, malaj.

Don Belianiso de Grekujo al Don Kihoto de la Mancha

Soneto

Mi pli diris, faris, tranĉis... fulmpasis
Ol ĉe l'mond' vagira la kavaliro;
Arogante, sperte, brave, verdiro!;
Ofendilojn mi venĝitaj plenlasis;

Miaj heroaĵoj ĉien fampasis;
Regalita mi amant', laŭ deziro;
Al mi nek giganto estis ja miro;
Duelante ĉion ajn mi frakasis.

Ĉe piedoj miaj jen la Fortuno;
Kapti ĉe la nuko mia saĝforto
Eĉ senharan la Okazon ja scias;
Duelante ĉion ajn mi frakasis.

Kvankam alten, en la kornojn de l'Luno
Estis jam metata mia bonsorto,
Ho, Kihoto granda, vin mi envias!

S-ino Oriano al Dulcineo de l'Toboso

Soneto

Dulcinjo bela, se kastelo mia
Por granda la trankvilo kaj komforto
Jam starus ĉe l'Toboso, se bonsorto
Londonon ŝanĝus je vilaĝo via.

Kostumon kaj dezirojn de gracia
Dulcinjo mi alprenus ĝis la morto;
Kihoton vian en bataloforto
Rigardi, jen deziro ambicia.

Kapabla por forkuro se mi estus
El Amadiso, kiel vi forlasis
Tre ĉaste Don Kihoton senkondiĉe;

Ne enviante, male mi do restus
Eĉ gaja, dum malĝojo min frakasis,
Ĝuante jam senkoste kaj feliĉe (1).

Gandalino, armservisto de Amadiso de Gaŭlo al Sanĉo
Panzo, armservisto de Don Kihoto

Soneto

Salutojn, ĉar ĉe l'Tero, fama viro,
Fortuno milde saĝe vin decidas
Armservi; sendaŝere vi do vidas
Postenon plenumita, laŭ deziro.

Fosilon nek falĉilon kavaliro
Malsatas por vagiri; li, do, fidas
Je armservista la simplec'; mi ridas
Pri Lunon piedpremi, fuŝaspiro.

Envias mi azenon, nomon, viajn,
Kaj vojaĝsakon plenan je provizoj,
Tre saĝa singardemo vin honoras.

Ho, bona Sanĉ', al vi salutojn ĉiajn,
Ĉar vin nur riverencas kun precizoj
Hispana Ovidio, eĉ vin gloras (2).

(2) Je du mejloj de Londono (Ĉapitro LLV.^a de Amadiso) staris kastelo malgranda sed la plej komforta el la tuta lando, en kiu loĝadis Oriano, kiun multfoje vizitis Amadiso, pro kio rezultis senkreditigo por ŝi, kaj tial ĉi tiu enviis Dulcineon. Oriano estis filino de la Reĝo Lisuarte kaj de la Reĝino Briseno.

(1) Per la soneto Gandalino ridindigas la malfeliĉan kaj humilan Sanĉon, ĉar ĉiuj aŭtoroj havas por ceteraj armservistoj ĉiajn respektojn, pro iliaj altrangaj kvalitoj kiel ĉefaj kaj nobelaj personoj, ne detiritaj de la plugilo kiel estis Sanĉo, Gandalino estis filo de Gandaleso, kiu vartis Amadison, kaj ĉi tiu kaj Gandalino estis kvazaŭ fratoj.

De la ekmaturiĝanta poeto Donoso al Sanĉo Panzo
kaj Rocinanto

Sanĉo Panzo, armservist'
de la Mancha Don Kihot',
de l'vilaĝo iris for
kun la cel' al bona viv',
ĉar Viljadiĝ' Tacit'
diris esti bona saĝ'
retrirĝi laŭ okaz',
tiel pruvas Celesti',
kiu estas libr' de Di'
se ĝi kaŝus pri malĉast' (1).

Jen mi, fama Rocinant',
venas mi de Babiĉk',
pro hazardo de la pek'
venis al Kihota man';
mi malmulte penis, sed
jen rapida galopad'
se necese ĝis manĝaj'.

(1) Decidas Sanĉo havigi al si kavalaran regalatan vivon forlasante sian vilaĝon, aŭ kiel oni diras proverbe en Hispanujo «irante tiujn de Viljadiĝo», kiu—la proverbo—estis al la konscio de Sanĉo kvazaŭ Kornelio Tacito. La *Celestino* aŭ *Tragika Komedio Kaliksto kaj Melibeo* estas unu el plej bonaj kastilaj libroj sed tre skandala pri amdiĉo, pro kio ĝin malpermesis la Inkvizicio, kaj en ĉi tiu libro oni legas ofte la aluditan proverbon, eĉ oni opinias esti la unua libro sur kiu ĝi aperas, kaj ĝia signifo estas aliri al alia loko por pasigi plej bonan vivon forkurante el danĝeroj aŭ el penoj.

ĉar mi pli, ol Lazari'
estas: vinon sorbis li
al blindul' per mia pajl' (1).

Furioza Orlando al Don Kihoto de la Mancha

Soneto

Vi ne estas Par' sed vin mi ja trovis
— Ho, heroo!—tia inter mil Paroj,
Tiel, do, postulas viaj la faroj
Ĉar neniu iam venki vin povis.

Mi, Orlando, kiun doloreŝovis
Anĝeliko, ĉien iris tra l'maroj
Proponante al la fam' ĉe l'altaroj
Bravon, kiun la forges' ne forblolis.

Mi ne kiel vi: honoron superan
Via herofamo al vi jam donas,
Kaj vi kiel mi ja perdis rezonon;

Tamen, mia ĝi, se Maŭron fieran
Vi, eĉ Cito'n, venkas, kiu deponas
Por ni pri la amo saman malbonon.

De Kavaliro Febo al Don Kihoto de la Mancha

Soneto

Ne mia glavo kiel via fortas,
Hispana Febo!, klera kortegano!;
Samglora ne kuraĝ' de mia mano
Ĉe lokoj, kie sun' naskiĝas, mortas.

(1) Rocinanto, kvankam malgrasa kaj malforta, havis ruzeton por kapti hordeon kaj pajlon, kiel la blindulgvidanta knabo Lazarillo de Tormes por sorbi la vinon el la kruĉeto, kiun tenis la blindulo, per longa sekala pajlo, kiun tiu enmetis en la kruĉeton.

Landkronojn mi rifuzas, ilin portas
Al mi eĉ ruĝa Orient' je vano;
Vizaĝon belan de Klaridiano
Mi ŝatas pli, ĉar koro ja komfortas.
Mirakle, strange, mi nur ŝin adoris:
Por mi de ŝia la domaĝ', infero
Mem timis mian brakon, kiu dresis
La furiozon ĝian; sed vin gloris
Pro Dulcine' konstante tuta tero,
Pro vi ŝin famhonesta ĝi konfesis.

De Solisdan al Don Kihoto de la Mancha

Soneto

Kvankam malsaĝaĵoj vin, ho, Sinjoro!,
Tre freneze jam cerbumis, domaĝo!,
Ne riproĉos vin malinda malsaĝo
Eĉ malnobla kun malbona humoro.
Ja juĝistoj, herooĵoj kaj gloro
Viaj estos; por justec' la kuraĝo,
Malgraŭ bastonfrapoj al vi eĉ kaĝo,
Kiujn donis fivirar' sen honoro.

Se de bela Dulcine' vin atencus
Ammalfidelaĵo, nobla fianĉo!,
Kaj ŝi malestimus viajn ĉagrenojn,
Jen: ŝin same malfeliĉ' rekompencus;
Ĉar malsaĝa kuriero ja Sanĉo,
Ŝi kruela, kaj vi havis detenojn.

Dialogo inter Babiĉo kaj Rocinanto

Soneto

- B—Rocinanto, kiel vi tre malgrasas?
R—Ĉar nenion manĝas mi kaj laboras.
B—Ĉu horde' kaj pajlo al vi, do, foras?
R—Nek plenuĝon mia mastr' por mi lasas.
B—Ĝentilecon, ve Sinjor'!, vi frakasas;
Mastron via azenlang' malhonoras.
R—Jes, azen' dumvive tia longhoras.
Jen: nur por li temp' pri amo jam pasas.
B—Estas am' malsaĝo. R—Pli, ne rezono.
B—Vi, metafizika! R—Ĉar mi ne manĝas.
B—Plendu je l' servisto. R—Mi, suferanto,
Kiel plendi, malpli ĉe la malbono,
Ĉar la mastr' kaj armservisto aranĝas
Ĉion laŭ azeno aŭ Rocinanto?

ĈAPITRO I

Pri la karaktero kaj sinokupado de la fama Junkro Don Kihoto de la Mancha

En loko de la Mancha, kies nomon mi ne volas memori (1), antaŭ nemulte da tempo vivis junkro el tiuj havantaj lancon en breto (2), malnovan ledŝildon, malgrasan cevalaĉon kaj rapidkuran ĉashundon. Poto kun iom pli da bovaĵo, ol da ŝafaĵo, retransĉetita viando salspicita (3), plej multenombrajn noktojn, ĉagrenoj kaj frakasitaĵoj (4) sabatojn, lentoj vendredojn kaj iu kolombido plie dimanĉojn, konsumis tri kvaronojn de lia rento. La alia kvarono estis por sin vesti festtage per kvazaŭ mallonga ampleksa surtuto senbutona el delikata drapo, kruralĝustigitaj pantolonoj kaj pantofloj el veluro; kaj labortage per vestaro el netinturita landrapo cindrokolora kaj kiel eble plej delikata. Kun

(1) Oni opinias, ke ĉi tiu loko estas Argamasilla de Alba, naskiĝloko de Don Kihoto.

(2) La nobeloj kutimis lasi aŭ meti la lancojn en bretojn ĉe siaj vestibloj aŭ internaj kortoj.

(3) Por profiti la viandon, kiu restis el la tagmanĝo, estis kutimo retransĉetadi ĝin por la verpermanĝo.

(4) Estis kutimo ĉe iuj lokoj de la Mancha, ke la ŝafistoj portu al la vilaĝoj, en la mastrajn domojn, la ŝafojn, k. c., mortintajn ĉu pro malsano, ĉu pro akcidento, kies karnon elostigis, peklis kaj sekigis; kaj la ostojn kaj ekstremajojn de la mortintaj bestoj oni frakasis kaj utiligis por fari manĝaĵojn, kiun oni manĝis la sabatojn, ĉar tiam estis malpermesate en Kastilujo manĝi viandon kaj grasajojn je la sabatoj, laŭ decido de Alfonso VIII^a, kaŭze de la venko de Las Navas de Tolosa kontraŭ la Maŭroj, je 1212, kaj ĉi tiun decidon nuligis, je 1748, Benedikto XIV^a. Humilega manĝaĵo kies nomo devenas de la perdo kaŭzanta ĉagrenon al maistro, kaj de la frakasado de la ostoj, koloj, kapoj, kruroj, k. c.

li logis ĉefservistino supermezuranta kvardekjaraĝon, nevino ankoraŭ ne dudekjara, kaj servisto por servi lin same ĉe la domo kiel ĉe la kampo, kaj kiu same enseligis la ĉevalaĉon kiel prenis la branĉtranĉilon por labori. Nia junkro estis proksimume kvindekjara, korpoforta kaj vivplena, plenmalgrasa, kun seka vizaĝo, tre fruellitigema kaj ĉasema. Iuj alnomis lin Kihada aŭ Kesada (ĉar pri ĉi tio la opinioj de la aŭtoroj priskribintaj pri li estas diversaj) kvankam laŭ verŝajnaj konjektoj lia familia nomo prave estis Kihana; sed ĉi tio ne gravas por nia historio, ĉar sufiĉas, ke la rakonto ne deflankiĝu de la vero. Sciu, do, ke ĉi tiu aludita junkro dum la tempo kiam li ne laboris (kiu estis la plej granda parto de la jaro) sin dediĉadis legi kavalirajn librojn, kun tiel granda atentemo kaj ŝato, ke li preskaŭ tutplene forgesis la ĉasekzercojn kaj eĉ la bonan administradon de siaj bienaĵoj, kaj tiel granda estis la scivolemo kaj malsaĝo pri tiaj libroj, ke li vendis vastan terbienaĵon por aĉeti ĉiujn kavalirajn librojn, kiujn li povis havigi al si, el kiuj li pli ŝatis tiujn, kiujn verkis fama Feliciano de Silva, ĉar ilian puran prozstilon kaj iliajn konfuzajn rezonadojn li juĝis superegaj, des pli legante iliajn laŭdojn kaj duelleterojn, kiuj multfoje diris al li: «La praveco de la malpraveco, kiun oni faris al mia praveco, tiamaniere malfortigas mian prudenton, ke mi prave plendas pri via beleco.» Kaj same kiam li legis: «La altaj ĉieloj, kiuj el via dieco die, kun la steloj, vin fortigas kaj faras meritanta la meriton, kiun meritas via altrangeco.» Per ĉi tiuj kaj aliaj samaj rezonadoj, la malfeliĉa junkro perdis la prudenton, kaj li terure sin cerbumis por ilin kompreni kaj konscii ilian sencon, kvankam eĉ Aristotelo mem ne komprenus ilin kaj konscius ilian sencon, se li revivigus. Li ne estis tute konforma pri la vundoj faritaj kaj ricevitaj de Don Belianiso; ĉar li opiniis, ke, spite de la spertaj ĥirurgiistoj lin kuracintaj, la vizaĝo kaj tuta korpo de Don Belianiso certe elmontris multenombrajn cikatrojn kaj haŭtmarkigitajn; sed, tamen, li laŭdis la aŭtoron pro lia librofino promesanta tiun nefinitan aventuron, kaj multfoje li estis tentata laborigi la plumon por fini vereme la libron,

laŭ la aludita promeso (1), kaj sendube li estus tion farinta kaj eĉ sukcesinta, se aliaj plej grandaj kaj konstantaj pensoj ne estus barintaj tion al li. Multfoje li disputis kun la paroĥestro de sia vilaĝo (kiu estis instruita viro, diplomito de Siguenza) (2) pri kiu el la du kavaliroj Palmerino de Anglujo kaj Amadiso de Gaŭlo estis plej bona; sed majstro Nikolaso, barbiro de la vilaĝo mem, opiniis, ke neniu el ili estas sama, kia kavaliro Febo, kaj ke se oni povis egaligi iun kun ĉi tiu, nur povis esti la egaligata Don Galaoro, frato de Amadiso de Gaŭlo, ĉar tiu havis kapablojn por ĉio, ne estante skrupulema kaj tiel plorema kiel sia frato, sed jes, tiel kuraga. Sekve tiel li enprofundiĝadis en la legadon, ke li pasigis ĉiujn noktojn de l'vesperiĝo al tagiĝo kaj la tagojn de l'tagiĝo al vesperiĝo legante, kaj tiel, kaŭze de nedormo kaj troa legado, lia cerbo sekiĝis tiel, ke li perdis la saĝon. Ĉio, kion li legis sur la libroj same pri ensorĉoj kiel pri disputoj, bataloj, dueloj, vundoj, laŭdoj, amoj, uraganoj kaj malsaĝaĵoj neebblaj, plenigis lian fantazion, kaj tiamaniere ĉio tio ĉi enradikiĝis en lian menson, ke li konsciis vera tutan aron el tiuj revitaj elpensitaĵoj legataj de li kaj ne ekzisti por li en la mondo alia historio pli certa. Li diris, ke Cid Rui Diaz estis tre bona kavaliro, sed ke oni ne povis lin kompari kun la Kavaliro de l'Arda Spado, kiu per unu sola bato de maldekstre dekstren tranĉis, tra la trunkoj, du sovaĝkuraĝajn grandegajn gigantojn; plibone li ŝatis Bernardon de l'Karpio, ĉar ĉi tiu, en la Roncesvala Kamparo, mortigis la ensorĉitan Roldanon, uzante saman manieron, kian uzis Herkuleso, sufokante inter siaj brakoj

(1) «Se mi finus tiel altgrade estimatan historion per ŝajnitaj, ĉi tio estus ofendo; tial mi nur lasos ĉi tiun parton, permesante al kiu ajn, al kiu venos la alia parto, ĉi tiun kunigi al tiu (Belianiso. l. 7, c. 75)

(2) Ĉi tio koncernas malgrandan scion de la pastro, kiu nur sin montras instruita pri kavaliraj libroj, ĉar Cervantes per ĉi tio ironie aludas la gradojn de la instruado ĉe la tiamaj duarangaj Universitatoj, kiel tiu de Siguenza.

Anteonon, la filon de la Tero. Li tre bone preparolis pri la giganto Morganto, ĉar, kvankam ĉi tiu apartenis al tiu giganta raso el fieruloj kaj malĝentiluloj, nur Morganto estis afabla kaj ĝentila; sed li ŝatis pli, ol iun ajn alian, Rejnaldon de Montalban, des pli kiam li vidis lin eliranta el lia kastelo kaj forrabanta ĉion kion li trovis antaŭ si, kaj ŝtelanta en Afriko mahometan idolon, kiu, laŭ priskribas lia historio (1), estis tuta el oro. Tre volonte li fordonus sian dommastrinon kaj eĉ sian nevinon kondiĉe ke li povus piedbatadi la perfidan Galalonon (2).

Efektive, plenperdinte sian saĝon, li enfalis en la plej strang-an penson, kiun iam havis frenezulo en la mondo: li nenion konsciis pli konvena kaj necesa, same por pligrandigi sian honoron, kiel por la servo de la ŝtato, ol fariĝi vagiranta kavaliro kaj ekiri tra la mondo kun siaj armiloj kaj ĉevalo serĉi aventurojn kaj praktiki ĉion kion li estis leginta pri agadoj de vagirantaj kavaliroj, riparante ĉiajn ofendojn kaj sin metante laŭokaze en danĝerojn, ĉi tiujn venkante, kaj havigante al si tiel senmortan nomon kaj famon. La malfeliĉulo ja opiniis sin kronata de la kuraĝo de sia brako, almenaŭ imperiestro de Trapisondo; kaj tiel, per ĉi tiuj al li agrablaj pensoj, tirate de la stranga ŝato, kiun sentigis al li tiaj pensoj, li rapidpretigis necesajojn por efektiviĝi tion, kion li deziris: unue, li purigis armilojn, kiuj estis el liaj prauloj, kaj rustaj, plenaj je polvo kaj de antaŭ jarcentoj forgesitaj, staris en angulo de la hejmo. Li purigis kaj aranĝis ilin kiel eble plej bone; sed li rimarkis ke la armilaro havis grandan mankon ĉar la la kasko ne estis kompleta, nur ĝi estis kvazaŭ

(1) «Ho, bastardo!—aldiris Rejnaldo al Roldano, kiu malbonintence kritikis liajn rabojn—; ho, filo de malĉastulino!, vi mensogas pri ĉio, kion vi diris, ĉar ŝteli al la idolanoj de Hispanujo ĉion ne estas rabo, ĉar mi sola, spite de pli ol kvardek mil Maŭroj, ŝtelis al ili mahometon el oro, kiu estis necesa al mi por pagi miajn soldatojn» («*Spiegulo de Kavaliroj*»).

(2) Unu el la Dekdu Paroj, pro kies perfido, la Maŭroj plenvenkis la francan militistaron.

ferĉapo, sen la parto por ŝirmi la vizaĝon; tamen li tuj elpensis kaj lerte faris el kartonoj la mankantan parton, kiun li kunigis al la ferĉapo, donante tiel al ĉi tiu ŝajnon de kompleta kasko. Sed li volis sin konvinki pri la rezisto de sia faritaĵo kontraŭ tranĉanta frapo de spado kaj elingigante sian kaj ĉi tiun svingante kontraŭ ĝi, per unu sola tranĉbato, li detruis ĉion, kion li estis farinta dum unu semajno, pro kio li malkontentiĝis kaj ĝin refaris, refortigante ĝin internen per trabetoj el fero por eviti la danĝeron pro facila rompebleco, restante jam kontenta, kaj ne volante ĝin provi denove, li ĝin konsideris delikata kaj forta vizaĝŝirmilo. Poste, li iris vidi sian ĉevalaĉon, kaj, kvankam ĝi havis pli da kvar hufendoj (1) kaj pli malbonaĵojn ol havis la ĉevalo de Gone-lo (*tantum pellis et ossa fuit*) (2) ŝajnis al li esti pli bona ol la Bucefalo de Aleksandro kaj ol Babiako de l'Cido. Dum kvar tagoj li pensadis kian nomon doni al ĝi, ĉar, laŭ li diris al si mem, ne estis saĝe, ke ĉevalo de kavaliro tiel fama kaj estante tiel bona ne havu konatan nomon; pro ĉi tio, li celis alnomi ĝin tiamaniere, ke la nomo deklaru tian kia ĝi estis antaŭ ol ĝin posedi vagiranta kavaliro, kaj kia ĝi estis tiam, ĉar estis tre juste, tial ke la mastro ŝanĝis sian staton, ke ĝi ankaŭ ŝangu la nomon alprenante faman, brilegan, decan por la nova ordeno kaj por la nova posteno, kiun ĝi jam alprenis; kaj tiel, forminte, foriginte, aldoin-te, malfarinte kaj refarinte multenombrajn nomojn en sia me-

(1) Grava malsano de la hufoj.

(2) Petro Gonelo estis histriono de l'duko Borso de Ferraro (XV jarcento. Priskribas pri li Gontano, Poggio kaj Ludoviko Domenichi, kiu kompilis kaj publikigis liajn histrionaĵojn, el kiuj koncernas nian historion tiu pri la salto farita de la ĉevalo de Gonelo de balkono teren, ĉar tial ke Gonelo vetis kun la duko pri kiu ĉevalo saltos pli, ĉu lia, ĉu tiu de la duko, tiu perfortdevigis sian ĉevalon salti, kvankam ĝi estis maljuna, mabela kaj senkarna preskaŭ. Priskribis verse la salton Karlo Gabrielo d'Ogobbio. La latinaĵo koncernas Plauto'n, kiu parolante pri malgrasa ŝafido diris, ke ĝi estis nur felo kaj ostoj: *qui ossa atque pellis totus est* (*Aulularia*, III^a akto, VI^a sceno).

moro kaj imago, li, fine, ĝin alnomis Rocinanto, nomo, laŭ lia opinio, alta, belsona kaj signifanta tion, kio estis ĝi kiam ĉevalaĉo, antaŭ ol esti de vagiranta kavaliro, kaj ankaŭ la plej bonan el ĉiuj ĉevaloj de la mondo. Alnominte ĝin kaj laŭ sia plej granda ŝato, li volis sin alnomi, por kio li ankaŭ pripensadis dum ok tagoj, sin alnomante fine DON KIHOTO; kaj de ĉi tiu alnomo, laŭ estas dirite, devenis la opinio de la verkistoj de ĉi tiu vera historio por ne dubi pri lia nomo KIHADO kaj ne KESADO, kiel opiniis aliaj. Sed rememorante ke la kuraĝa Amadiso ŝatis aldoni al sia nomo tiun de sia regno kaj patrujo por ĉi tiun famigi, sin alnomante Amadiso de Gaŭlo, same li volis, kiel bona kavaliro, aldoni al sia nomo tiun de sia patrujo, kaj tial sin alnomi DON KIHOTO de la MANCHA per kiu, verŝajne, li deklaris sian nobeldevenon kaj sian patrujon, ĉi tiun honorante per la aldono.

Puriginte, do, siajn armilojn, farinte la ferdaŭron kompleta kasko, nominte sian ĉevalon kaj alnominte sin mem, li konsciis manki nur al si serĉi amatinon, ĉar vagiranta kavaliro sen amatinio estis kvazaŭ senfolia kaj senfrukta arbo, kvazaŭ korpo sen animo. Li diris al si mem. Se mi, pro miaj pekoj aŭ pro mia borsorto, renkontas ie giganton, kiel ofte okazas al vagirantaj kavaliroj, kaj mi faligas lin teren, aŭ mi tranĉas lin ĉe la trunkmezo laŭ du pecoj, aŭ, fine, mi venkas aŭ submetas lin, ĉu ne estos dece havi tiun al kiu lin sendi, por ke li sin prezentu surgeniigante antaŭ mia kara bela kormastrino kaj dirante al ŝi per humila kaj petanta voĉo: «Mi, Moŝta Sinjorino, estas giganto Karakuliambro, mastrosinjoro de l'Malindriana insulo, kiun venkis per eksterordinara duelbatalo kavaliro Don Kihoto de la Mancha, la kavaliro neniam sufiĉe bone laŭdata, kiu ordonis al mi min prezenti antaŭ via sinjorina Moŝto, por ke vi disponu min laŭ via plaĉo?» Ha, kiel ĝojis nia bona kavaliro, kiam li estis farinta ĉi tiun paroladon, des pli kiam li trovis tiun, al kiu offeri sian koron! Okazis, laŭ oni kredas, ke, en vilaĝo proksima je lia, estis bela fraŭlino, terkulturistino, kiun iam li amis, kvan-

kam, laŭ oni komprenas, ŝi neniam sciis lian amon, nek ĉi tiun ŝi eĉ suspektis: ŝi estis nomata Aldonzino Lorenzo, kaj ŝajnis al li bone sin titoli mastrino de liaj pensoj; kaj serĉante por ŝi alnomon ne malpli glora ol lia estis, kvazaŭ de princino aŭ de altranĝulino, li venis sin alnomi DULCINEO (1) de l'TOBOSO, ĉar ŝi naskiĝis kaj loĝis en tiu loko; kaj ĉi tiu alnomo ŝajnis al li belsona, eksterordinara kaj fama, kiel ĉiuj ceteraj, kiujn li aligis al siaj aĵoj.

(1) DULCINEO devenas de DOLCE aŭ DULCE, kiu, per aldono de la hispana artikolo *al*, fariĝis *Aldonza*, laŭ prava opinio de Covarrubias, malgraŭ tiu de pastro Mariana, kiu diras, ke *Aldonza* estas kiel *Alfonsa*, sed la opinio de la unua alkonformigas pli al la celo de Cervantes.

